

KOMUNIKOJ

TRIMONATA BULTENO DE SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ
Jaro 44-a BRAZILIO, APRILIO-MAJO-JUNIO 2020 N-ro 178

“Amu vian Dion per via tuta koro
kaj per via tuta animo kaj per via tuta
menso kaj vian proksimulon kiel vin mem.”
JESUO (Mt, 22:37-40).

“Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte
rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro.”
KARDEC. *La Evangelio laŭ Spiritismo*.
Ĉap. 19, §7.

“Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante
unu la alian, la popoloj faros en konsento
unu grandan rondon familian.”
ZAMENHOF. *La Espero*.

MI VIDIS JESUON!



IAM, IA MUZIKO venis al mi de fore...

luvespere, en la lumo de la subiranta suno, mi ekpensis:

“Kia estu la voĉo de Jesuo? Mi neniam sentis ĝiajn mildajn, belsonajn vibradojn...

Sed, en tiu vesperiĝo, mi aŭdis belsonan pepadon de birdo tre proksime al miaj oreloj.

Kaj tiu pepado estis tiel milda kaj melodia, ke mi certiĝis, ke la parabolo pri la lolo kaj tritiko estis esprimita en tiu momento.

Kredeble mi ne povos, nek iam ajn povos vidi la lumbrilan rideton de la Majstro, kiam Li benadis la infanetojn.

Kaj iumatene, pensante pri tio, mi ekaŭdis la intensan brilon de roĝo gaje kantanta, kaj mi sentis la Sinjoron karesanta per siaj mildaj fingroj la harojn de infano, kaj diranta al li: “Estu benata!”

Kiom ajn mi strebus, mi neniam povis kompreni la tenerecon de Lia rigardo, kaj, subite, ĉe la vesperiĝo, la Lakta Vojo brilegis kaj ĉe la brilo de la stela flagrado estis al mi klarigite kiel Jesuo nin rigardadis, kiam Li instruadis, sidante en kanoto, ĉe la marbordo de Galileo.

Venteto tra foliaro reprezentas movadon de la diaj fingroj ĉe la mizerikorda favorkoreco por niaj kulpoj.

Kaj, fermante la okulojn, kun la koro larĝe malfermita al la Dia amo, nun mi povas aserti: Mi vidis Jesuon!

Danke al Dio!

Spirito: Antônio Francisco

Mediumo: Manuel Francisco

El la portugala lingvo tradukis esperanten, Benedicto Silva

Kunlaboris: João Ângelo

“Personoj povas fali, se iliaj piedoj el viando kaj ostoj perdas la forton; sed la ideo neniam falos, kaj kie falis unu batalanto, pli malpli frue sin trovos dek aliaj, pli fortaj kaj pli lertaj”.

Zamenhof

(El la “Unua etapo de esperanto”, Eldonejo Ludovikito, paĝo 461)



AMIKOJ DE LORENZ



AYMORÉ VAZ PINTO, ano kaj konstanta kunlaboranto de Asocio Lorenz, naskiĝis la 29an de januaro, 1939, en urbo 'Mirassolândia'. Lia patro, Jorge Vaz Pinto, naskiĝis en urbo Catalão. Li diplomiĝis pri medicino en 1967 ĉe Federacia Universitato de Gojaso. Kiel kuracisto, Aymoré specialiĝis pri Hematologio en Parizo, Francio, ĉe "Nouveau Hôpital Beaujon". Li faris postgradan kurson en la kadro de Hematologio kaj Imunologio en Meksiko, ĉe Nacia Aŭtonoma Universitato de Meksiko kaj laboris dum 23 jaroj kiel medicina profesoro ĉe Universitato de Braziljo.

Aymoré sciis pri Esperanto pere de la revuo "Reformador", oficiala organo de Brazila Spiritisma Federacio, kiam li estis studento. Ekde sia emeritiĝo kiel profesoro, li sin dediĉis al la volontula laboro ĉe la sidejo de Brazila Esperanto-Ligo. Dum 9 jaroj, Aymoré estis kasisto de BEL.

Aymoré partoprenis en projekto por esperantigi spiritismajn librojn kaj volontulis dum longa tempo ĉe la sidejo de Brazila Esperanto-Ligo kaj okupis postenojn en ĝia estraro. Li estis prezidanto de Asocio Spiritisma Mondo, elektita en decembro 1996.

Aymoré, kune kun aliaj s-anoj, kompilis la verkojn "Neforgeseblaj skribaĵoj de Ismael Gomes Braga" kaj "Ni lernu kun Porto Carreiro Neto".

Nome de la estraro kaj konsilantaro de Lorenz, ni tutkore vin dankas, kara frato Aymoré!

(Kunlaboris: Eurípedes Barbosa)

KUNLABORU! – Membriĝu ĉe ASOCIO LORENZ kaj helpu la disvastigon de Esperanto kaj Spiritismo en la tuta mondo!

COLABORE! – Torne-se membro da ASSOCIAÇÃO LORENZ e auxilie a divulgação do Esperanto e do Espiritismo em todo o mundo!

LORENZ

"KOMUNIKOJ"

TRIMONATA BULTENO DE LORENZ – SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ
Fondita la 15-an de decembro 1975

Jaro 44-a – n-ro 178 | Aprilo-Majo-Junio 2020

Interreta kaj papera senpagaj eldonoj
Ĉirkaŭ dudek mil legantoj en la tuta mondo

KONTAKTIĜU KUN NI KAJ ALIĜU:

Spiritisma Eldona Asocio F. V. Lorenz
Rua Francisco Vale, 57 Engenheiro Leal
21370-171 Rio de Janeiro-RJ – Brasil (Brazilo)
Telefonoj: ☎ + 55-21-98485-4539 ☎ + 55-21-2450-4768
Fejsbuko: Editora Lorenz | Retadreso: editora_lorenz@uol.com.br
Retpaĝo: <http://editoralorenz.blogspot.com.br>

MALĜOJA GLORO

João da Cruz e Souza - Brazilo

Vi, homoj, kiuj ja admiras gloron
De la venkintoj en batal' milita,
En kiu sango estis elverŝita,
Kaj la furioj semis malhonoron;

Kaj kie plantis hombestc' teroron,
Kaj kie detruadis senhezita
Furor' per fer' kaj fajro daŭrigita
Homvivojn kaj kulturan la laboron;

Malĝoja estas ĉiu tia gloro!
Eĉ de l' herooj la sentema koro
Pripensas tiun venkon kun doloro.

Admiru, homoj, vera kun estimo,
La paclaboron nobla de l' animo,
Luktanta por la vera bom', sen timo!

TRISTE GLÓRIA

Vós, homens, que admirais a glória dos que venceram nas pugnans bélicas, em que o sangue foi derramado e as fúrias semearam a desonra; e onde a bestialidade humana plantou o terror, e o furor sem exaltações destruiu pelo ferro e pelo fogo as vidas humanas e o trabalho da cultura, sabe que triste glória é essa! Mesmo os corações sensíveis dos heróis pensam com dor em tal vitória.

Admirai, homens, com verdadeira estima, o trabalho da paz da alma nobre que luta sem temor pelo bem real.

Reformador, Feb. 1950, p. 32
Kunlaboris: Aymoré Vaz Pinto



Kompostita de Rogério Mota

AGADO DE SPIRITISTOJ EN BRAZILA ESPERANTO-MOVADO

Eurípedes A. Barbosa



Fojfoje oni aŭdas aŭ legas kritikojn kontraŭ esperantistoj-spiritistoj, kiuj, laŭ la opinio de la kritikuloj, forpuŝas el E-movado materiistojn, ateistojn kaj aliajn religiulojn. En 2001, aperis en “La ondo de esperanto” opinio de esperantisto, kiu diris, ke Brazila E-Ligo estas ilo de spiritistoj por disvastigi iliajn “filozofiojn”. En tiu tempo, mi estis volontulo ĉe la sidejo de BEL, kaj mi konstatis, ke la tiama estraro respektis la neŭtralecon de Esperanto.

Oni scias, ke brazilaj esperantistoj estas plejparte spiritistoj kaj ke ekzistas spiritismaj societoj, kiuj disvastigas spiritismon per Esperanto. Ne nur spiritistoj faras tion. Oni trovas en Jarlibro de Universala Esperanto-Asocio notojn pri pluraj institucioj, kiuj diskonigas siajn ideojn kaj doktrinojn per Esperanto, ekzemple: Ateista Tutmonda Esperanto-Organizo, Bahaa Esperanto-Ligo, Budhana Ligo Esperantista, Tutmonda Ekumena Ligo, Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista kaj aliaj. Reprezentantoj de tiuj organizoj partoprenas en Universalaj Kongresoj por ĉefe disvastigi siajn ideojn. Ĉu tio estas ofendo kontraŭ la neŭtraleco de Esperanto? Tute ne.

En la 30-aj jaroj de la pasinta jarcento, Esperanto-movado en Brazilo stagnis, precipe pro manko de studmaterialo. Mi certas, ke sen la laboro de esperantistoj, sen libroj en librovendejoj Esperanto mortas. En 1936, Ismael Gomes Braga proponis, ke Brazila Spiritisma Federacio eldonos Esperantajn librojn. La tiama prezidanto de BSF, Guillon Ribeiro, donis apogon al nia movado, kaj ĝi vigle eldonis grandan nombron da libroj en kaj pri Esperanto kaj propagandaj broŝuroj kaj prospektoj. Tiel Esperanto-movado renaskiĝis en Brazilo. La revuo “Reformador”, oficiala organo de BSF,

publikigis kaj publikigas ankoraŭ artikolojn pri Esperanto, kaj multe da brazilaj esperantistoj ekkonis nian lingvon pere de tiuj artikoloj.

Ismael Gomes Bragas deklaris, ke la tuta serio de lernolibroj eldonitaj de Brazila Spiritisma Federacio estas la plej absoluta neŭtraleco pri religio kaj politiko, do eĉ la plej furiozaj malamikoj de Spiritismo kaj Kristanismo povos trankvile uzi ilin.

Ne ĉiam spiritistoj estis la plimulto el la brazilaj esperantistoj. Antaŭe, katolikoj havis specialan lokon en nia movado. Dum pli ol 30 jaroj, Brazila Esperanto-Ligo estis prezidita de Couto Fernandes, fervora katoliko. En letero de la 9-a de oktobro 1976, Wilson Veado, esperantisto el ‘Minas Gerais’, skribis al Nelson Pereira de Souza jenajn vortojn: “Jam fluis la tempo kiam la katolikoj kaj protestantoj tiom laboradis por Esperanto. La Ligo mem estis speco de sidejo de katolika por-Esperanta laboro.”

Kiam Brazila Spiritisma Federacio komencis eldoni Esperantajn librojn, Couto Fernandes ne bone akceptis la ideon. Li supozis, ke tio malhelpos nian movadon. Poste, li rekonis la gravecon de la kontribuo de BSF, ĉar Esperanto vekiĝis en Brazilo, sen danĝero por la neŭtraleco. Ofte Couto Fernandes laŭdis la laboron de BSF favore al Esperanto.

Antaŭ la kritikoj, ni, esperantistoj-spiritistoj, devas iri trankvile nian vojon. Ĉiam eblas batali kontraŭ nescio kaj antaŭjuĝo, precipe pere de bona laboro kaj konstanta klarigado.



103-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, EN PORTUGALIO

Rinaldo Galindo



LA 1-AN DE AŬGUSTO, 2018, merkredo — Libera tago.

Tiam, mi difinis viziton al la Sanktejo de Fátima. Kiam mi alvenis tien, la suno subiris, kaj la esperantistoj ĝojadis en etoso de feliĉo. la zefiro karesis iajn vizaĝojn, kaj poste estiĝis ia forta vento, kiu ĉien forblovis rozpetalojn el la florbudoj, parfumante la aeron.



La amemo de nia Patrino Maria el Nazareto estis sentata de ni ĉiuj, esperantistoj, kun multaj nekompreneblaj impresoj. Ni revenis al Lisbono sabate, la 4-an de aŭgusto, je la fino de la Kongreso.

La rememoroj plenigis niajn korojn je ĝojo ĉe la adiaŭoj. Vespere mi vojaĝis kun sinjorino Socorro al Israelo. La flugo havis interhalton en Madrido. En la tiea flughaveno ni iris al la informpanelo por infomiĝi pri nia flugo. Iom timide, mi demandis iun fraŭlinon, en la angla lingvo. Surprizite, ŝi

rigardis mian flugbileton kaj diris al mi: “Ankaŭ mi flugos al Israelo. Mi loĝas tie.” Mi prezentis al ŝi la sinjorinon, kiu vojaĝis kun mi. Tiam ŝi demandis: “De kie vi venis?” mi respondis: “Ni venas de la Esperanta Kongreso, kiu okazis en Portugalio”. Kun rideto ŝi diris: “Ankaŭ mi!”

Ŝi etendis la brakojn kaj nin brakumis.

Ni ĉiuj sentis grandegan ĝojon kaj feliĉon. Tiam mi pensis: Kiel Esperanto estas, efektive, ia frateca lingvo!

Ek de tiam nia babilado estis nur en Esperanto.

En la Televiva flughaveno ni adiaŭis.

En la hotelo ni atendis la esperantistojn de nia grupo.

Nia scivolemo estis kontentigita per promenadoj en Israelo, kiel, ekzemple, vizito al la Preĝejo de la Sankta Tombo, al la Fortreso de la Reĝo Davido, al la Preĝejo de la Naskiĝo en Bet-Leĥen de Judujo, al la Rivero Jordano, kie okazis la bapto de Jesuo, kaj al pluraj aliaj lokoj.

Fine, ni alvenis al Nazareto. Tie ni vizitis la Templon de Bahaismo, kie oni ankaŭ disvastigas kaj uzas Esperanton.



Daŭrigo de 103-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, EN PORTUGALIO

Poste ni iris al la Preĝejo de Anunciacio, kie nia Patrino, Maria de Nazareto, naskiĝis kaj ricevis la viziton de la Anĝelo Gabrielo. En tiu preĝejo, vizitante la galerion kun la pentraĵoj de la Patrino Maria, kun ŝiaj aperoj en pluraj landoj, jen mi ekvidis pentraĵon kun la skribaĵo: Nia Sinjorino de Espero,

Patronino de la Esperantistoj. Larmoj ruliĝis sur mia vizaĝo! La ĝojplorado miksiĝis kun la dankosentoj. Tiam mi venigis la aliajn anojn de nia grupo por kune festi tiun malkovron. Fine mi sentis min dronita en ia tutaĵo, kaj tiun tutaĵon en ni.

El la portugala, tradukis: Benedicto Silva

Aliaj fotoj pri la travivaĵoj de Rinaldo Galindo pere de Esperanto:



Karaj geamikoj el la tuta mondo, se vi volos ricevi, senpage, pere de Interreto, pdf-ajn versiojn de Almanakoj Lorenz, sciigu al ni vian retadreson kaj kun granda ĝojo ni ilin sendos al vi: editora_lorenz@uol.com.br

Klara Domahidi

PRINTEMPA DANCO

(Tavaszi Tánc)


Jam forpasis longa vintro
malaperis neĝ', glaci'!
Tra ŝvelanta burĝonaro
nun alridas sunradi'.

Kun kalikaj rosaj gutoj
jungalantoj jam gestas!
Pro gajegaj birdokantoj
la printempo ĉeestas.

Dum zumanta vento milda
plensekiĝas kav', vojo,
la violo herbareja
jam estiĝas trovaĵo.

Jen admiras vestojn novajn
kornusfloroj kaj branĉoj
kun petaloj ekflirtantaj
jam, dancadas floretoj.

(Trad.: Adri Pásztor, la 24-an de majo 2019-a)



LA VIVO

Adri Pásztor

Naturinfanon dum eduko
la patro al la viv' preparas:
sin kaŝi de l' malvarmo-indas,
dum pluv' kaj vent' kaj suno karas.

Ho, ĉasi kaj viandon baki
kuraci, plugi instruadis
praul' la filon, kaj bredadi -
kaj ĝis la vera venk' luktadi.

Se nun plenkreskas la infano,
atendas lin tuj senlaboro.
Estas diplom' kaj koro ama
ja vanaj en la grava horo.

La vivkondiĉoj malriĉiĝas,
la parenaro ne juniĝas -
kaj kiam venas naskiĝtagoj,
donacoj jam ne kolektiĝas.

Donaco estas mem la vivo,
se vi finvivi sana povas:
labor', nutraĵo se troviĝas,
se samhejman' hejmanon fidas.

(La 31-an de marto 2007)

Raimundo Souza



La 5-an de aprilo elkarniĝis en Rio-de-Ĵanejro, Brazilo, ano de Asocio Lorenz, Raimundo Souza. Nia samideano estis lerta poeto, inkluzive premiita en diversaj konkursoj. Li estis konstanta kunlaboranto de "Almanako Lorenz" kaj "Komunikoj".

Omaĝe al nia frato, jen poemo publikigita en "Almanako Lorenz".

Ĝis baldaŭ, kara Raimundo!

VENU, ZAMENHOF!

Raimundo Souza

Venu, venu al ni, Zamenhof,
Venu, venu por helpi la homaron,
Venu por plibonigi la komprenon inter ili.

Kelkaj el ili bruligis nian tendaron
Kaj malplenigis la pneŭon de nia buso,
Ankaŭ ĵetis ŝtonon tra la fenestro
Kiu vundis gesamideanojn.

Venu, venu, Zamenhof, por ke
Ili komprenu nian lingvon
Kaj nian internan ideon.

Ni ĉiuj amas la tutan homaron,
Ni abomenas neniun
Kaj ili ne komprenas tion.
Venu, venu, venu al ni, Zamenhof,
Venu, por ke inter ili estu paco!